



INFORMILO

Numero 3/eo

Majo 2004

La laborista Esperanto-movado

La publikigado en 1887 de la unua gramatiko de la internacia lingvo kiu baldaŭ estos konigita sub la nomo **Esperanto** altiris kun rapideco tre heterogenan aron da homoj. Oni povas aserti ke la majoritato apartenis al tio kion ni povus alnomi klerigita etburgaro. Tamen, dekomence troviĝis kerno de laboristoj, kiuj rimarkis la uzeblecon de internacia lingvo en la defendo de la idearo de la internacia movado de la laboristoj, ene de la t.n. *proleta internaciismo* kiun kunhavis la plejmulto de la sociaj kaj politikaj laboristaj organizaĵoj tiutempaj.

Kvankam komence la t.n. esperantista movado konservis unuecon super la socia klaso aŭ la idearo de siaj anoj, baldaŭ okazis grupiĝo de la personoj pli proksimaj al la socialistaj ideoj. Dum la jaro 1903 registriĝas la fondado de la unua klubo de laboristaj esperantistoj, en Stokholmo. Tuj poste formiĝis novaj grupoj je loka aŭ nacia niveloj, kaj ankaŭ kelkaj klopodoj de internacia organizado.

En aŭgusto de la jaro 1921, en Prago, fondiĝis nova organizaĵo grupigonta la laboristojn dezirantajn uzi Esperanton serve al la lukto de sia socia klaso. La elektita nomo estis **Sennacieca Asocio Tutmonda** (SAT).

De sia fondiĝo oni specife flegis la principon de **pluralismo** ene de la organizaĵo, rilate al la tendencoj troviĝintaj en la ĝenerala laborista movado. Tiel, SAT permesas la ekziston en sia sino de organizitaj frakcioj de socialistoj, komunistoj, anarĥiistoj, ekologistoj, ktp. La konvivado de tiuj ĉi ideoj en la sino de unu nura organizaĵo ne ĉiam estis facila, sed nuntempe ĉiuj tendencoj laboras kune en ĉies komunaj celoj.

En Hispanio, la anoj de SAT aŭ kiuj troviĝas proksimaj al ties ideoj, grupiĝas en la asocio **SAT-en-Hispanio (SATeH)**, kolektivo kies celo estas la laboro per kaj por Esperanto en la hispanaj laboristaj kaj progresemaĵoj medioj. En tiu ĉi bulteno ni informas vin pri la disvolviĝo de niaj agadoj kaj klopodoj. Ni estas malfermaj al via (kun)laboro.

Noto: Tiu ĉi *Informilo* publikiĝas ankaŭ en la hispana lingvo. Se vi deziras tiun version, petu ĝin al ni.

Agadoj kaj novaĵoj

» Nia asocio partoprenis en la **tagoj por la solidareco** organizitaj de la Universitata Socia Asembleo kaj Senlandlimaj Inĝenieroj, okazintaj en la Universitato *Carlos III* de la apudmadrida urbo Leganés de la 23a de februaro ĝis la 5a de marto, per prelego kaj intensiva kurso.

» Publikiĝis en hispana lingvo la libro *Memoroj de liberecano*, verkita de la anarkiisma kataluno, delonge ekzilita en Francio, Alfons Martorell. Krom esperantisto li mem, li estas patro de la konata Floréal Martorell, respondeculo de la muzikentrepreno *Vinilkosmo*.

» La pasintan 11an de marto okazis terura atenco en Madrido, kun la sekvo de pli ol 200 mortintoj kaj pli ol mil vunditoj. SATeH kondamnas tiun barbarajon, frukton de la fortoj de la malhelo kaj solidaras kun la viktimoj. En nia retpaĝaro vi povas legi nian komunikon pri tiu bedaŭrata terorigo, kaj ankaŭ tiun de SAT.

» Dum la 14a de aprilo la hispanaj respublikanoj kunmemoras la datrevenon de la **Dua Hispana Respubliko**. Okaze de tiu kunmemoro, ni komencis je tiu tago la publikigon de iom longa dosiero pri tiu historia periodo. Ni esperas esti kapablaj ĝin publikigi papere en iu ne tre malproksima estonto.

» Ni ankaŭ kunmemoras per tradukita artikolo la 30an datrevenon de la portugala *Revolucio de la dianoj*.



» Okaze de la Internacia Tago de la Libro, en grava kultura centro de Madrid (la Beletra Cirklo) oni organizis la tradician seninterrompan legadon de la *Kihoto*. Kiel vi scias, tiu ĉi universala majstroverko estas tradukita al nia lingvo. Nu, anoj de la movado, inter ili de SATeH, partoprenis tiun ĉi jaron, per la legado de kelkaj fragmentoj en Esperanto.

La tradukon de la *Kihoto* vi povas akiri en nia *Libro-servo*, kune kun aliaj verkoj de la internacia literaturo.

Datreveno de la naskiĝo de Lanti

En julio de tiu ĉi jaro ni celebras la 125 datrevenon de la naskiĝo de Eugène Lanti. Lia nomo estas apenaŭ konata ekster Esperantujo kaj tre malmulte en nia movado mem. Kaj tamen lia figuro estas tre interesa.

Lanti estis la kunfondinto kaj ĉefa gvidanto de "Sennacieca Asocio Tutmonda" (SAT), la asocio de esperantistaj laboristoj, kaj la teoriulo de nova doktrino, la **sennaciismo**, kiu celis la forigon de la koncepto de nacio kiel gvida ideo de la socia organizado. La sennaciismo neniam estis fermita doktrino. Oni povus ĝin kompreni kiel radikalan kosmopolitismen, ne nur en la senco de la forigo de la nacioj, sed ankaŭ pro ĝia socia engaĝiĝo kontraŭa al la ekspluatado de la laboristoj. La rolo de Esperanto kiel rimedo de egaleca interrilato estis kerna en tiu ĉi idearo.

La vera nomo de Lanti estis Eugène Adam, kaj li naskiĝis en malgranda normanda vilaĝo en 1879. Li alprenis sian pseŭdonimon (bazitan sur sia franca kromnomo, *L'Anti*) en 1921. Lia nomŝanĝo estis tiel radikala (krom el leĝa vidpunkto) ke li permesis al si la *ŝercon* anonci la memmortigon de E. Adam, kio estis publikigita en iuj revuoj kiel reala okazigo.



SAT, sub la influo de Lanti, donis multan gravecon al la **kultura aktivado**. La beletra stilo de Lanti estas alte taksata kiel ekzemplo de klareco kaj simpleco. Li verkis ĉefe eseajn tekstojn, sed ankaŭ estas tre interesa lia traduko en Esperanton de *Kandid* de Voltaire.

Lia figuro kaj lia politika evoluo estis polemikaj, ĉar ne mankis konfliktoj en SAT dum tiuj unuaj jaroj kaj ĝiaj rilatoj kun la cetero de la *neŭtrala* E-movado ne ĉiam estis facilaj. Sed Lanti estis ankaŭ unu el la plej konsideritaj homoj inter la esperantoparolantoj pro sia radikala engaĝiĝo kaj sia atento al la personoj de modesta intelekta novelo, al kiuj li direktis sian tutan penadon.

Lanti forpasis en Meksikio, en januaro de 1947: al lia pesimismo pri la politika situacio aldoniĝis la pligraviĝo de lia doloriga malsano, kaj ĉio kune kondukis lin al la memmortigo.

SAT plu disvolvas sian politikan kaj kulturalan laboron, ankoraŭ kun plej multaj el la specifaj trajtoj per kiuj Lanti ĝin stampis. Lastatempe eĉ estis rekonstruita la sennaciista frakcio kiun Lanti estis inspirinta en la '30aj jaroj. Taŭgu tiu ĉi teksto kiel modesta omaĝo al lia senlaca strebado kaj rememorigo pri lia socia kaj beletra profilo.

La kongreso de SAT

La ĉijara SAT-kongreso okazos la unuan fojon en slovakia ĉefurbo **Bratislava**, inter la 14a kaj 21a de aŭgusto kun turisma *postkongreso* en Prago de la 21a ĝis 28a de aŭgusto (kiun eblas viziti ankaŭ memstare). El la riĉa programo de la SAT kongreso mi menciuj almenaŭ kelkajn allogaĵojn: ekskursojn i.a. en atomcentralon, al surdanuba valbaraĵo Gabčíkovo, kaj al aliaj historiaj kaj kulturaj celoj. El prelegoj ni nomu almenaŭ tiun de Klaŭdo Roux pri la natursciencaj terminoj en la nova PIV kaj multajn aliajn.

Alia grava esperantista *Kongreso*, la eŭropa, okazos en **Bilbao** fine de aŭgusto. En venonta *Informilo* ni informos vin kun plia detalo.

Aliĝu al SAT kaj al SATeH!

Helpu nin plifirmigi la laboristan Esperanto-movadon Vi povas fariĝi ano de SATeH, kuntaktante kun nia asocio. La baza kotizo estas de nur 5 eŭroj.

Se vi deziras aniĝi al SAT, je kio ni vin kuraĝigas, ni informas vin ke tiu ĉi internacia organizaĵo disponas je peranto en Hispanio por faciligi la ekonomiajn transpagojn kaj la fluojn de informado kaj de materialoj diversaj. Se vi deziras, ni povas meti vin en kontakto kun la persono kiu portas tiun respondecon. Ne hezitu nin skribi.

Servoj

Memoru ke, kiel ni jam rakontis en nia antaŭa bulteno, ni povas havigi al vi librojn en Esperanto, pere de nia *Libro-servo*.

Sed krome, de nun ni disponas je plia materialo por proponi al vi.

Unualoke, la politikaj, sociaj kaj beletraj publikigaĵoj de *SAT-Broŝurservo*. Inter ili, tradukoj de verkoj anarĥistaj (Bakunin, Kropotkin), socialistaj (Lafargue), pacifistaj (Thoreau), ekologiistaj (Bookchin), ktp. Tre interesa estas la historio de la laborista Esperanto-movado en Hispanio, *Laboristaj kronikoj*, de Antonio Marco. Kaj ne forgesu pri *La komunista manifesto*.

Ni ankaŭ povas provizi vin per diskoj en Esperanto, ne nur sociaj, sed de ĉiu tipo de muzikaj stiloj. Pri tiu ĉi nova servo ni informos vin en venonta numero. Same, ni informos vin pri la vojaĝreto de SAT *Amikeca Reto*, kiun ni ankaŭ atentis.

Skribu al ni, kaj ni sendos al vi katalogon de niaj publikigaĵoj kaj servoj.

Vi povas trovi ĝin ankaŭ en nia retpaĝo, en la adreso: <http://satenhispanio.eresmas.com/kulturo.htm>. Tie vi povas aliri al alia kultura materialo, kiel retaj libroj, kantaĵoj originalaj kaj tradukitaj, afiŝoj, ktp.



Tekstoj originalaj kaj tradukitaj

Ni daŭrigas nian aktivadon de traduko de kulturaj aŭ politikaj interesaj tekstoj en Esperanto, En nia retpaĝaro vi povas legi tekstojn verkitajn de José Saramago, Gregorio Peces-Barba, Michel Collon, Werner Seppmann, materialo pri la ĉeesto de la religio en la hispanaj lernejoj, pri la eŭropa Konstitucio, pri la milito en Irako. Aŭ la teksto verkita de la filmisto Julio Medem, pri la procezo de kreado de la dokumenta filmo *La eŭska peloto*, polemika verko pri la politikaj konfliktoj en Vaskio.

Se vi estas interesita kaj ne havas aliron al la Interreto, ne hezitu skribi al ni kaj peti paperan kopion de la tekstoj kiujn vi dezirus legi.

Por kontakti kun ni:

Asociación Izquierda y Esperanto SATeH (SAT-en-Hispanio)

Poŝtokesto (Apartado de Correos) 8537, (ES-)28080-Madrid

satenhispanio@eresmas.com

<http://satenhispanio.eresmas.com>